Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo lundon la 18-an de februaro 2019 per Skype.
(Protokolo aprobita la 14-an de marto 2019)

Partoprenis:
Amelie Matt en Tromsø
Anne Karin Bondhus en Bryne
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Lars Sandbakk en Sandnes ekde punkt 4
Ulf Lunde en Os ekde punkto 4
Mario Machlik en Tromsø

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 21-an de januaro
Aprobita.

2. Ekonomio
Skagen Vekst : kr 60 446,- (59 478,-)
Skagen Høyrente : kr 134 083,- (133 806,-)

3. Jarraporto, jarkalkulo 2017 kaj 2018
Hodiaŭ ni povis aprobi kaj la jarraporton kaj la jarkalkulon de 2017 por aperigo en nia membrogazeto. Ulf sendos la finan version de la jarraporto al la redaktoro de Norvega Esperantisto kaj al la estraranoj. Li ankaŭ komencos la laboron pri la jarraporto de 2018. Ĝin ni devus finpretigi dum la venonta estrara interkonsiliĝo (14/3) kaj aperigi en la dua numero de la membrogazeto kies limdato estos 29/3.

4. Landa Kongreso 2019
La klubo en Tromsø plu laboras pri la planado de la kongreso. Ni proponas rezervi ĉambrojn en *Smarthotel Tromsø*. Tiel ĉiuj kongresanoj povus esti samloke. Ĝi situas en komforta piedira distanco al nia kunvenejo en stadiono *Alfheim*. Kompreneble la partoprenontoj povas ankaŭ mem trovi alian tranokteblecon laŭ propra deziro.

5. Datoj por la venontaj estraraj interkonsiliĝoj
Venontfoje ni interkonsiliĝos ĵaŭde, la 14-an de marto je la 20.00.

6. Eventualaĵoj
Nenio

La interkonsiliĝo daŭris 19:45 - 20:50
La venonta interkonsiliĝo okazos la 14-an de marto 2019.

Raportis Mario Machlik